



# Boletín

Nº 448 Oktobro - Decembro 2024



*Asociación de utilidad pública*

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio  
aperanta de 1949  
Numero 448

Redakto-skipo

Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: José Antonio del Barrio

Retadreso de la bulteno:  
bulteno@esperanto.es  
angelarquillos@gmail.com

\*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la  
respektivaj aŭtoroj

\* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

\*Republikado de enhavo nur permesita kun per-  
meso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio  
*Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31  
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926  
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon  
en la aŭtomata respondilo

Estraro

Prezidanto: Ángel Arquillos López

Vicprezidanto: Alberto Granados Orcero

Sekretario: Manuel Parra

Vicsekretario: Elsa Martínez Castro

Kasisto: Jesús M. García Iturrioz

Voĉdonantoj: Vicente Manzano (Viko)

“ María Milagros Mezo

Junularaj aferoj: Pako Balibrea

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)

DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400 (pdf-a)

ISSN 2444-8397 (papera)

# SALUTVORTOJ

Karaj gelegantoj,

Kiel kutime, nia bulteno enhavas plu-  
rajn novaĵojn, sed bedaŭrinde ne ĉiuj  
estas bonaj, pro la katastrofa ŝtormo  
DANA, okazinta en la provinco Va-  
lencio, kie loĝas multaj esperantistoj,  
sed bonŝance ĉiuj fartas bone kaj  
daŭre kunvenas por praktikado de la  
lingvo en bona etoso.

La bonaj novaĵoj estas la okazonta  
HEK en la urbo Sorio, al kiu jam  
aliĝis pli ol 80 samideanoj kaj mi es-  
peras ke la cifero duobliĝos tre baldaŭ  
post la legado de la artikolo pri la  
evento sur la paĝoj 4, 5 kaj 6.

Pluraj grupoj sendis al la redakitejo  
etajn raportojn pri la Zamenhof-tago,  
al kiuj mi dankas kaj gratulas, ĉar la  
fotoj senditaj diras ĉion. Bedaŭrinde  
ne ĉiuj grupoj kunsidis pro diversaj  
kialoj, sed mi scias ke ili iamaniere  
festis la neforgeseblan tagon,

Ne mankas artikoloj pri temoj, kiuj ne  
rilatas al Esperanto, sed kun tre inter-  
esa kaj amuza enhavo.

Nur restas deziri al vi ĉiuj Feliĉan No-  
van jaron 2025.

Ĝuu la legadon

La redaktoro

# ENHAVO

Salutvortoj	1
Nova eldono de la Scienca Kalendaro	2
Fundación Esperanto	3
Novaĵoj pri la 83-a Hispana Kongreso de Esperanto en Sorio	4
Eldonita libro de Vicente Risco en Esperanto	7
Jam pretas la manlibro pri katalogado	8
Pri Grupoj Kaj Asocioj	9
La stranga angulo, ĉapitro 14-a	15
Mi pardonpetas	18
Pri la inundego okazinta en Vakencio	22
Centjariĝo pri la Deklaracio de Ĝenevo 1924 pri rajto de infanoj	23
Fervoja angulo	24
Kampara birdo, urba birdo	26
Nekrologoj	28
Iom da Matematiko (16)	31

\*Sur la ĉefpaĝo Kristo de Korkovado lumigita verdkolora okaze de la Zamenhof-tago

---

## NOVA ELDONO DE LA SCIENCA KALENDARO

La Scienca Kalendaro de la hispana Supera Konsilio por Scienca Esplorado (CSIC) denove havos esperantan version en la jaro 2025. Memoru ke temas pri kalendaro kiu ĉiun tagon de la jaro memorigas eventon aŭ scienciston, kun aparta atento al diverseco

Ĝi aperis jam en la retejo de CSIC, kun akompano de materialo en facila lingvaĵo kaj proponoj por agadoj. Vi povas ĝin trovi en la retadreso [https://](https://digital.csic.es/handle/10261/374870)

[digital.csic.es/handle/10261/374870](https://digital.csic.es/handle/10261/374870), el kie vi povos elŭti belan pdf-forman dosieron. La kalendaro havas ankaŭ tŭiteran konton, kiu ĉiutage informas pri la koncerna datreveno, en la adreso: <https://twitter.com/scikalendaro>.



# FUNDACIÓN ESPERANTO

## INFORMADO PRI 2024

La helpoj programitaj por 2024 estis anoncataj kaj publikigataj en n-ro 444 de "Boletín" (okt-dec.2023 p. 10) de HEF.

En 2024 ni disponis je multe pli da rimedoj ol kutime. Tiu eksterordinara situacio devenas de la sindonemo de bonfarulo kiu denove faris donacion al ni kaj de la altaj rezultoj de la investoj de la fondaĵo.

Ni aprobis la jenajn helpojn:

- HEF: 2.000 €. Pro riparoj en la sidejo de la asocio kaj aliaj elspezoj.
- E- Grupo de Bilbao: 2.000 €. Pro organizado de kursoj kaj eksterordinaraj elspezoj de la komunumo de proprietuloj rilate al la fizika sidejo.
- "Frateco": 1.000 €. Pro kursoj kaj kromaj elspezoj de la komunumo de proprietuloj de la sidejo.
- Segovia Esperanto-Asocio: 1.000 €. Pro organizado de kursoj, ekspozicioj, ktp.
- MEL (Madrida E-Liceo): 500 €. Pro elspezo rilate al la sidejo.
- SATenH: 500 €. Pro publikigo de libro "Volontuloj kun okulvitroj".
- "Liberanimo": 500 €. Pro organizado de prelego en Osko kaj eldono de broŝuroj.
- Niko Voloshyn: 500 €. Por publikigo de dulingva (esperanta/hispana) libro "Rakontoj pri skulptisto".

Probable, estis la jaro kiam F. Esperanto povis injekti pli da mon-kvanto al E-grupoj. Oni povas aldoni, ke alvenis tiom da petoj, ke ni ne aprobis ĉiujn. Sed, ni kuraĝigas la agadon de la grupoj por la venonta jaro, en kiu ni certe povos helpi pli.

## PROJEKTOJ POR 2024

Helpoj por instruado kaj disvastigado de Esperanto.

Oni helpos diversajn aktivaĵojn por Esperanto.

Ekz.: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj...

Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.

La petoj devos esti ricevataj antaŭ ol la 30a de novembro de 2025.

Kutime, ni helpas prefere al E-grupoj kaj pro aktivaĵoj jam faritaj.

Principe, la tuta kvanto disponebla por helpoj estos 5.000 €.

Lorenzo Noguero  
(Prezidanto de F. Esperanto)

# NOVAĴOJ PRI LA 83-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN SORIO

Antaŭeniras la preparoj de la Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 1-a ĝis la 4-a de majo 2025 en Sorio (Malnova Kastilio). La Organiza Komitato kunvenas ofte, kaj jam havis kontaktojn kun respondeculoj de la urbestro, kun kulturaj asocioj kaj kun diversaj servoj de la urbo.

En la retejo <https://kongreso.esperanto.es/> vi trovos multajn informojn, pri la loko, la loĝado kaj manĝado, la transporto, la programo, kaj ĉefe la aliĝilon kaj la listo de jam aliĝintoj (je la fino de la jaro 2024, jam pli ol 70 homoj!)

## **Praktikaj informoj**


La ĉefa sidejo de la kongreso estos la Espacio Santa Clara. La malnova preĝejo de Sankta Klara kaj ĝia monaĥinejo estas du sensakraligitaj konstruaĵoj, kiuj situas proksime de la urbocentro. Ili funkcias nun kiel kulturcentro. En <https://kongreso.esperanto.es/la-kongresejo/> vi trovos detalojn pri ĝia historio kaj arkitekturaj detaloj.

En la pasinta Boletín ni inkludis la ĉefajn informojn pri la publika transporto al Sorio, sed nun en <https://kongreso.esperanto.es/transporto/> vi trovos pliajn detalojn kaj ligilojn.

La LKK ne zorgos pri la loĝado, sed ni interkonsentis kun iuj hoteloj, por atingi rabatojn por la kongresanoj. En <https://kongreso.esperanto.es/logado/> vi trovos la detalojn, plus liston kaj ligilojn al gastigejoj kun variaj prezoj kaj kvalitoj. Ĉiukaze, ni rekomendas ke vi rezervu kiom eble plej baldaŭ, ĉar la festoj de la komenco de majo estos tre altiraj en tiu urbo.

Informojn pri restoracioj, ĉefe pri tiuj plej proksimaj al la kongresejo, vi trovos ĉe: <https://kongreso.esperanto.es/mangado/>. Ni provis inkludi informojn pri la eblecoj de vegetaraj menuoj.

La Kongreso organizas komunan tagmanĝon por la dimanĉo 4a de majo en la Hotelo Alfonso VIII. La menuon kaj prezon vi trovos en: <https://kongreso.esperanto.es/ferma-bankedo/>. Denove ni rekomendas ke vi mendu ĝin kiom eble plej baldaŭ. Mendilon vi trovos en tiu sama retejo.



## KULTURA PROGRAMO

La Organiza Komitato ankoraŭ laboras pri la kongresa programo, pri kiu ni jam povas konfirmi ke ĝi estos tre riĉa el kultura vidpunkto, kun speciala atento al literaturo kaj muziko, kaj enhavos multnombrajn distrajn kaj turismajn agadojn.

### Literaturo

Sorio estas urbo proksime ligita al literaturo, kun gravaj lokaj verkistoj, kaj kiu servas kiel inspiro por kelkaj el la ĉefaj hispanaj poetoj, kiel Antonio Machado, Gustavo Adolfo Bécquer kaj Gerardo Diego.

La kongreso entenos poezian vesperon, en kiu oni deklamos poemojn de tiuj kaj de nunaj aŭtoroj kiel Concha de Marco, hispane kaj esperante. Ĝi inkludas specialan omaĝon al la soriana poeto María Ángeles Maeso, unu el kies libroj estis eldonita en dulingva eldono, “Vamos, vemos / Ni iras, vidas”, tradukita kaj prologita de Miguel Fernández, Esperanto-poeto kaj verkisto, tradukinto en Esperanton ankaŭ de, inter aliaj, Federico García Lorca, Miguel Hernández y Ramón del Valle-Inclán, kaj nuna direktoro de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio.

Ni kalkulas je la partopreno de Antonio Valén, kiu mem estas soriano, kaj de Abel Montagut, kiu prezentos siajn “Abelajn projektojn”. Ambaŭ elstaraj esperantaj verkistoj kaj tradukistoj.

Ankaŭ estas planata la prezento de novaj libroj ĵus eldonitaj.

### Muziko

Ne mankos muziko en Esperanto, kiu ankaŭ estos malfermita al la urba publiko.

Ni povas konfirmi la ĉeeston de JoMo, muzikisto el Tuluzo, kiu partoprenis en aliaj hispanaj renkontiĝoj, kun tre vigla spektaklo.

Ni kalkulas ankaŭ kun Kaj Tiel Plu, grupo el Barcelono, kiu prezentas tradician katalunan, okcitanan kaj hispanan muzikon, tradukitan en Esperanton, tre altkvalitan.

### Prelegoj kaj konferencoj

La programo enhavos aron da prelegoj kaj konferencoj, pri tre diversaj temoj, en Esperanto, pri kiuj ni laboras, kaj pri kies detaloj ni informos poste.

Okazos ankaŭ trejnkursidoj, inkluzive de Esperanto-kurso malferma al la ekstera publiko.

Ne mankos distraj kaj organizaj agadoj. Se vi mem deziras kontribui, ne hezitu kontakti la organizan komitaton.



## TURISMA PROGRAMO

La programo kompletiĝos per ampleksa turisma programo, por ke vizitantoj konu la urbon kaj la ĉirkaŭantan provincon.

Pluraj itineroj estas planitaj ene de la urbo Sorio mem, inkluzive de la ĉefaj monumentoj, akompanataj de profesiaj gvidistoj.

Estas konfirmita ekskurso al la restaĵoj de la antaŭromia kuŝejo Numantio (Numancia), je kelkaj kilometroj de Sorio. Ĝi estis unue keltibera kaj poste romia urbo.

Historie grava ĉar ĝi rezistadis la romian konkeron dum dudek jaroj. La ekskurso okazos dufoje: sabate, la 3an de majo kaj dimanĉe, la 4an de majo (se vi estas membro de HEF, prefere mendu la dimanĉan ekskurson, por eviti koincidon kun la Ĝenerala Kunveno). La buso startos el la kongresejo je la 09.30 kaj revenos ĉirkaŭ la 12a horo. La prezo estos 12 €, por maksimume 50 homoj ĉiutage.

Lunde la 5-an, por tiuj, kiuj povas resti, oni povos ĝui postkongresan ekskurson al urboj de la provinco, inkluzive de el Burgo de Osma kaj Calatañazor. La buso startos el la kongresejo je la 09.00; ni faros rapidan viziton al la proksima fortikaĵo Fortaleza Califal de Gormaz, kaj en El Burgo ni vizitos ĝiajn ĉefajn vidindaĵojn. Tamen, ne eblos eniri la katedralon, ĉar lunde ĝi estas fermita. En Gormaz kaj El Burgo ni havos oficialan gvidiston. Ni kune tagmanĝos en restoracio je la 14.00 (ĝi inkludita en la prezo, kaj la menuon oni povas trovi en la retejo). Por la reveno la buso startos je la 17.00 kaj mezvoje haltos en pitoreska vilaĝo Calatañazor por libera mallonga vizito. Reveno en Soria inter la 18.30 kaj 19.00. La prezo estos 45 €.

Pliajn informojn kaj mendilon vi trovos en: <https://kongreso.esperanto.es/ekskursoj/>.



# ELDONITA LIBRO DE VICENTE RISCO EN ESPERANTO

En la numero 446 de Boletín ni informis pri la vizito al la Fondaĵo je la nomo de Vicente Risco en la provinco Oŭrenso en Galegio, kaj la unuaj kontaktoj pro kunlaboro, kaj pri la rilato de tiu grava galega intelektulo kun Esperanto. Ni ĝojas anonci ke la kontaktoj fruktiĝis, kaj ke la rezulto estas la eldono de libro kun tekstoj de Vicente Risco en Esperanto, aperinta ĝuste en la antaŭtago de la Tago de la Libro en Esperanto, meze de decembro 2024.

La libro titoliĝas “Galegio estas mondo”, kaj temas pri kolekto de aforismoj, mallongaj pensoj aperintaj en diversaj liaj verkoj kaj artikoloj. La libreto jam ekzistas en la galega, kastilia kaj deko da aliaj lingvoj.

Tiel la Fondaĵo ankaŭ tenas viva la heredaĵon de Vicente Risco, ĉar Esperanto estis inter la kulturaj fluoj pri kiuj li interesiĝis. Li havis rilaton kun la esperantistaro en sia urbo, li posedis eldonon de la Fundamento de Esperanto, kiu estas konservita en la sidejo de la Fondaĵo Vicente Risco, kaj li lernis la bazajn elementojn, kaj, kvankam ne estas certe ke li uzis ĝin sisteme, li montris sian simpatian al lingvo en diversaj gazetartikoloj.

La libron tradukis Alejandro Pareja Rodríguez (mem pranepo de renoma verkisto de la galega *Rexurdimento*). Kunlaboris en la eldono Fundación Esperanto, kiu disponas je ekzempleroj por tiuj interesitaj.

José Antonio del Barrio




# JAM PRETAS LA MANLIBRO PRI KATALOGADO

Jam eblas deŝuti el Bitoteko la manlibron pri katalogado, kiun mi verkis surbaze de RDA, ricevinte prian peton en la listo de prizongantoj de Esperanto-bibliotekoj. Temas pri la unua versio, kiu tre verŝajne bezonos ankoraŭan poluradon.

La manlibro fokusiĝas en la katalogado de monografioj, sed en ĝi estas ankaŭ instrukcioj pri la kreado de aŭtoritataj rikordoj kaj rikordoj pri la ekzemplero en Koha, utilaj por ĉiuspecaj materialoj. Ĝin komplementas plia aparta gvidilo: Formato MARC 21, provizore nur pri tiuj kampoj bezonataj por monografioj.

Se la manlibro montriĝas utila, eblus verki poste instrukciarojn por la katalogado de seriaĵoj kaj aliaj nelibraĵaj materialoj.



Cetere, mi kreis kolekton en Bitoteko, Bibliotekistejo, por anstataŭi tiun iame lokita en la retejo de Biblioteko Juan Régulo, jam malaperinta. Tie kolektiĝu la kreitaj labordokumentoj bezonataj de bibliotekaj prizorgantoj.

Jen la ligiloj:

Malibro pri katalogado:  
<https://hdl.handle.net/11013/7338>

Formato MARC 21:  
<https://hdl.handle.net/11013/7339>

Bibliotekistejo:  
<https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/handle/11013/7337>

Ana Manero

# PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

## ZAMENHOF-TAGO

### ZARAGOZO

Z-Tago (kaj Libro-Tago) denove estis okazo por kunvoki fratecanojn:

Kiel kutime (aparte) en Hispanio, festo manifestiĝis kiel malfasto, kiel celebra kunmanĝo kaj kuntrinko. Tiel, frateca Z-bankedo okazis denove en agrabla restoracio ĉe nia sidejo.

Tostoj povas esti ilo aŭ preteksto por esprimi bonajn dezirojn al kuntrinkantoj (ja tostoj vekas emociojn pli ol testoj, kaj estas pli inspirigaj ol tistoj aŭ tastoj). Parafrazante (aŭ paraversumante) iun spritan esprimon de Mikaelo Bronŝtejn (el ties kanto-poemo "Sinjoro Munkeno") jen tosto-propono:

*Jen ĝojiga kuntinto:*

*Pro l' anto, onto kaj into!*

Ni memoris pri aliaj kiuj en aliaj okazoj kuncelebris kun ni (ili ja estis iel kun ni). Ni komentis, ke en tiu preciza Z-Tago okazis multaj aliaj celebroy en la mondo. Kaj meni-cindas, ke en Brazilo, la fama Kristo de Rio-de-Janeiro estis lumigita per verda koloro omaĝe al Esperanto.

Tom antaŭe (la 10an de decembro, 70 jarojn post Montevidea UNESKO-rezolucio pri Esperanto), ni renkontiĝis en nia sidejo. La propono estis celebri la Vorton kaj nian amikecon.



Ja en nia lingvo preskaŭ simila formo de vortoj povas pensi nin pri proksimeco de la konceptoj "vorto" kaj "forto".

Kiel eĥo de gravaj vortoj, ni sugestis memori pri 2 eroj ("Rideto" kaj "Kredo") deklamitaj de kuba esperantistino Georgina Almanza dum UK en Valencio en 1993. Memorindas, ke en 2024 okazis la unua UK en Afriko. Ja UK-oj tre gravas gravas. Sed ankaŭ kukoj (Je la fino, estis surprizo gustuminda).

Kaj ni substrekis faman esprimon: "En la komenco estis la Vorto". Per tiuj vortoj, Sankta Johano komencis sian Evangelion. Kaj per vorto, per (unua) libro komenciĝis Esperanto.

Kaj por fini, ankaŭ bonvenas vorto(j). La devizo aŭ moto(ro) proponata povus esti::

**KE LA VORTO AKOMPANU... NIN!**

Lorenzo Noguero

## SEVILO

### Celebrita la Tago de "onklo Zam" en Seviljo.



La 15-an de decembro oni celebris en restoracio Campeones la Zamenhofa Tago.

Pli ol dekduo da samideanoj kaj familianoj festis tie en tre agrabla etoso. Estis interŝanĝoj da donacetoj, elstarante torton kun la figuro de Zamenhof sur ĝi printita kio estis surprize manĝebla (kiel bongusta estis li, kara prapatro Ludoviko).

Por pliiĝi la esperantan etoson ni starigis tol-volvaĵon kun la motivo de nia renkonto, krom kelkaj ĉemizoj kun la kvinpin-ta verdostelo.

Ni tostis je la nomoj de l' forpasintoj ĉi-jare.

Ĝis la venonta, do .



## TERUELO

"La pasintan 16an de decembro LIBERANIMO festenis la Zamenhof-tagon. Unue okazis la ĉi-jara ĝenerala kunveno de la asocio, kaj poste la frata komuna vespermanĝo. La estraro kaj prezidanto de la asocio estis reelektitaj. Raporto kaj foto aperis en la loka "Ĵurnalo de Teruelo".



## VALADOLIDO

La 15an de decembro, tri esperantistoj de Valladolid, Pedro, Ángel kaj Rafi, tagmanĝis kune en restoracio kaj festis la Zamenhofan tagon.



## MALAGO



Malgraŭ mia sanstato, mi kuraĝis partopreni la Zamenhof-feston kun kelkaj gesamideanoj en la kutima Kafejo Esperanto, kie ni tostis je la memoro de la kreinto kaj dum pli ol unu horo ni bablis kaj krokodilis pri diversaj temoj, ĉefe pri la venonta HEK okazonta en Sorio kaj niaj spertoj pri la lingvo internacia, danke al renkontiĝoj kaj kongresoj.

En tre bona etoso ni gustumis ĉokoladon, kafon kaj aliajn trinkaĵojn akompanataj de bongustaj "benjetoj" (en la hispana, churros)

## OURENSO



Ankaŭ en la provinco Oŭrenso okazis modesta celebrado de la Zamenhofa Tago. Kvin amikoj profitis la okazon de la eldono de “Galegio estas mondo”, traduko al Esperanto de libro de Vicente Risco (vidu apartan artikolon en tiu ĉi Boletín), por viziti la urbon Allariz, kie troviĝas la sidejo de la Fondaĵo Vicente Risco, ricevi la unuajn ekzemplerojn, kaj poste trinketi kaj babili honore al la Majstro.

## ALIKANTO

Zamenhof Tago 2024 de samideanoj de la provinco Alikanto (Valencia Komunumo, Hispanio)

Ĝi okazis en Centro Cívico y Social de Los Montesinos.

La programo komenciĝis je la 11.00 h per bonveniga matenmanĝo sur la Placo Poste estis Esperanto-libroekspozicio kaj legado de la deklaro de homaj rajtoj, kaj fine frateca kunmanĝado.



## BILBAO



Zamenhof Tago en la sidejo de la Esperanta Grupo de Bilbao kun la partopreno de japana kaj kroata samideanoj.

Kompreneble estis kantado kaj multaj frandaĵoj.

## FUENLABRADO (MADRIDO)

Madrida Esperanto-Liceo kaj Fuenlabrada Esperanto-Ligo kune aranĝis la Zam-tagon en la ampleksa sidejo de ĉi-lastata. La dimanĉon 15an de decembro ekde la 11a horo okazis kelkaj prelegoj: pri origino de la egipta skribo, pri la venontjara IJK kaj aliaj E-eventoj en sudorienta Azio, pri la E-kursoj en UNED kaj pri la preparoj de la Hispana Kongreso en Sorio. Post la komuna tagmanĝo en proksima restoracio, denove en la sidejo, Mario prezentis du malgrandajn spektaklojn: kanton kun gitaro kaj magiaĵon per ludkartoj. Poste ni amuziĝis per grupaj tabluludoj. Dum la manĝo ni nombris 21 sami-deanoj, sed venis kelkaj pliaj, inter ili du nunaj estraranoj de TEJO: Lucia kaj Adamo.



## SEGOVIO



### **Unua Zamenhofa Tago de la Segovia Esperanto-Asocio**

La 15-an de decembro, la ĵus fondita Segovia Esperanto-Asocio organizis sian unuan Zamenhofan Tagon. La renkontiĝo, kiu okazis en segovia restoracio, estis plena de amikeco kaj entuziasmo. Esperanto-parolantoj de ĉiuj aĝoj kunvenis por konatiĝi, konversacii kaj ĝui la kompanion unu de la alia.

Ĉi tiu evento markas la komencon de nova ĉapitro por la esperanto en Segovia kaj montras la kreskantan intereson pri ĉi tiu internacia lingvo en la regiono. La asocio daŭrigos organizante eventojn kaj promociante la uzon de esperanto en la regiono.

## SANTANDERO



La 14an de decembro kunvenis en restoracio de Santander (Kantabrio, Hispanio) 15 membroj de KantEA (Kantabra Esperanto-Asocio), por kunfesti la Zamenhofan Tagon (Tago de la Esperanta Libro).

# LA STRANGA ANGULO

## ĉapitro 14-a

### **Antaŭ kutima publiko**

Lastatempe iu esprimo aŭskultiĝas ĉie. Mi trovas ĝin surstrate, en la universitato, en la vendejoj el la kvartalo, parolante kun familianoj... Ĉi tiun matenon mi malfermis ĵurnalon kaj la unua paĝo montris la esprimon per grandaj literoj. Poste, en la trinkejo, kien mi iris pensante matenmanĝi trankvile, pluraj homoj en unu el la ses anguloj krie babilis pri la sama afero.

Ĉu ne estas alia temo en la mondo?

Nun mi estas antaŭ publiko. Organizado el konkreta sevilja kvartalo vokis min por la tasko instrui najbarojn, ene de projekto pri civitana scienco. Mia rolo estas klarigi al ĉeestantoj, pri kiel funkcias amaskomunikiloj. Do mi, same kiel ĉiam en tia situacio, demandas "Pri kio vi scivolemas? Ni kumpensu!" Refoje la sama rezulto. Tiuj, kiuj respondas, mencias tiun saman temon, kiu ŝajne persekutas min.

Falsaj novaĵoj!

Falsaj novaĵoj!

Falsaj novaĵoj!

Duono el ili estas virinoj pli ol 70-jaraĝaj. Ili parolas pri netolerabla malfido al ĉio. "Kiam mi estis juna, oni sciis kion kaj kiun fidi. Nun ŝajnas al mi, ke ĉio estas malvero, ke oni jam ne scias, kion fari, kion spekti, kiel havi informon" "Mi jam ne deziras funkciigi televidon" "Mi ricevas multe da videoj kaj bildoj kaj mesaĝoj... Kio estas la vero? Kion mi faru?"

Do venis la vico refoje pritrakti falsajn novaĵojn.

Tamen ili ne atendis mian priskribon. Ĉu vi?

La kutima sinteno de homoj rilate al tiu temo estas "Mi nur estas viktimo, kiu nenion scias, sed politikistoj kaj sciencistoj scias, do ili faru ion, ekzemple punu la malbonulojn, kiuj mensogas nin per tiuj ŝajnaj novaĵoj; aŭ vi, profesoro de universitato, instruu nin, pri kiel dividi la veron de la malvero."

Do mia malfacila tasko konsistas, en montri al ili, ke ili ne estas viktimoj, ke la afero ne havas bonan solvon kaj ke ili ne deziras scii la veron.

En specifa kurso pri neveraj novaĵoj, mi dividas la aferon en kvin temoj: informo, leĝo, teknologio merkatdevena, politiko kaj psikologio. La unua kaj la lasta unuoj estas la plej ampleksaj. Mi eble nun ĝenos vin per nealloga priskribeto pri ĉiuj el tiuj temoj.

La mondo de la informado estis ĝis antaŭ ne multe sur la fako de ĵurnalistoj. Tiu mondo suferis multe da ŝanĝoj la lastajn jardekojn. Pluraj ĵurnalistoj daŭre luktas pro la deziro elkore informi, sed laboras en entreprenoj, kiuj havas aliajn celojn. De esplorigaj organizadoj, ĵurnalismo evoluis ĝis iĝi normala entrepreno, kiu serĉas trovi kaj restigi klientojn laŭ ilia ideologio kaj enkasigi ankaŭ pro la reklamoj. La kutima konsumanto de komunikiloj realigas du malfacile samtempajn taskojn: legi novaĵojn pro la celo scii pri la mondo kaj serĉi restigi en sia ŝtoniga maniero rigardi, klopodante ne lerni ion novan sed daŭre pensi tute same. Do ĵurnaloj kaj aliaj amaskomunikiloj havas la rolon kontentigi tian nekongruan leganton. La rezulto estas logika: aperas

kaj sinfortigas nekonektitaj insuloj de produktado-konsumado de informoj, kiuj rolas kiel ideologiaj pravigiloj. En tia mondo, kie estas la vero? Ĉu la koncepto "vero" gravas?

La mondo de la leĝo kaj rajtoj ricevas la taskon solvi la problemon de la falsaj novaĵoj pere de normoj kaj punoj. "Se iu malbone kondutis, respondece pagu". Eĉ se la puno estus la solvo, ĉu solvi la aferon punante eblas? Mia impresio estas, ke multaj landoj nuntempe okupiĝas pri tiu leĝo-produktado. Sed ili trovas longan vicon da problemoj. La unua estas, ke ne ekzistas klara difino pri kio estas falsa novaĵo, nek kiel bone scii pri, kiu estas la kulpulo, kiu la viktimo, kiu la konkreta ago, kiu la denonconto. Leĝo devas esti konkreta. Ne eblas teni ĝin per abstraktaj vortoj. Kaj ĝi bezonas ne havi dubojn antaŭ apliki punon. Alia barilo estas, ke la luktado kontraŭ la falsaj novaĵoj minacas la liberan esprimon, kiu estas unu el la ĉefaj apogoj de la demokratioj. Kelkfoje oni ne rajtas dubi pri, ĉu tio estas libera esprimo ĉu danĝera mensogo. Sed kutime la afero ne tiom klaras. Pro tio ĵurnalistoj emas bremsi tian leĝon. Ankaŭ politikistoj profitas de la okazo por akuzi la alian pri klopodo cenzuri. Tio jam estas okazanta en Hispanujo, kie diversaj politikaj partioj uzas tian temon por la celo damaĝi la publikan bildon de la aliaj. Oni ankaŭ konsciu, ke leĝo ne solvas la aferon. La falsaj novaĵoj flugas kaj abundas. La juĝistoj estas relative malmultaj. Ni ne havas sufiĉe da homa forto lukti. Kaj kiam la luktado okazas, eĉ kiam la leĝo venkas, la rezulto ne kontentigas: la damaĝo jam okazis. Eĉ la esploroj montras, ke la punoj plurfoje fortigas la damaĝon ĉar donas pli da videbleco al la konkreta falsa novaĵo. La grupo, kiu fidis ĝin, daŭre fidas eĉ kelkfoje pli sinfortigas danke al la puno.

La mondo de la teknologio, kiu eltenas la funkciadon de la sociaj retoj, ne sekvas la homajn bezonojn, sed la merkatajn celojn. La grandaj entreprenoj, kiuj sukcesas en la giganta Interreto, atingas sian profiton danke al kelkaj fontoj, unu el la ĉefaj estas la reklamoj. Reklamoj sukcesaj sendiĝas al precizaj publikoj. Pro tio, tia entrepreno kolektas personajn datumojn. Por la celoj kolekti datumojn kaj lerte montri reklamojn, oni bezonas, ke la publiko instu en la kanalo sinsekve montrante sian preferaron. Do Jutubo, Vacapo, Fejsbuko, Instagramo kaj la sufiĉe ceteraj konataj iloj, uzas siajn datumbazojn restigi la homojn en la tasko spekti dum nekonscia longa tempo. Tiu restado faciligas kolekti pli da datumoj kaj montri pli da precizaj reklamoj, fortigante la cirkulon. Nek tiuj entreprenoj nek tiuj konsumantoj serĉas veron. La unuaj serĉas monon. La duaj ne konscias, pri kion ili serĉas, sed restas pro la psika premio de la spektado. Psikologio montris,

kiel premii kondutojn atingante, ke ili estu pli oftaj. Kaj la teknologio de la sociaj retoj lerte aplikas tiun scion. La falsaj novaĵoj estas la plej alloga enhavo en sociaj retoj. Homoj samtempe ŝatas kaj malŝatas, plendas kaj serĉas, kaj fine estas prenitaj de ili. Kunhavigi falsajn novaĵon realigas kelkajn homajn emojn, kiel esti agnoskita de la aliaj aŭ resti en pli forta grupa identeco. Tiu psika funkciado perfekte konektas kun la surfaĉe priskribita funkciado de la sociaj retoj. Do, ĉu oni vere serĉas la veron en la sociaj retoj?

La mondo de la politiko estas interese sentita de la homoj. Iam mi faris humilan esploran surstrate. Mi montris unufolian tekston al pluraj laboristoj de vendejoj el mia tiama urbo. La enhavo estis redaktita de grupo de profesoroj, kiu tiam deziris informi al la civitanoj pri iu konkreta danĝera leĝo. Mi informis al miaj kolegoj, ke kelkaj vortoj eble demetos legantojn el la legado. Do mi esploris, ĉu tio okazas. Mi disdonis la folion

kaj atingis 100% de akcepto reveni sekvantan tagon kaj aŭskulti la opiniojn de la legintoj. La rezulto ŝokis min. Neniu el, laŭ mi, nerekomendindaj vortoj aŭ esprimoj levis ian reziston. Ĉiuj legintoj akceptis ilin. Tamen ĉiuj krom unu, montris sian malkomforton rilate al la sama esprimo. Unu post alia, ili rimarkigis min pri la bezono demeti tiun esprimon el la teksto. Mi ne povis imagi tian rezulton. La malkomfortiga esprimo estis "politikistoj estas normalaj homoj" Ho! Kia mensbato! Tiam mi komprenis la malfacile elteneblan nekongruecon de la publiko: "Mi plendas pri politika mondo, loĝata de koruptaj egoismaj homoj... Sed mi bezonas ilin. Ili estas inteligentuloj, kiuj havas povegon; ili estas nenormalaj homoj; mi bezonas pensi aŭ senti tion; ĉar nur superhomoj povas regi la landon kaj savi nin de la malbono". Ekde tiam, mi pli bone komprenas la kutiman emon sekvi iun savanton. Homoj allogiĝas de famuloj kaj gravuloj, same kiel ĉiam oni sentadas, ke la mondo ne estas horizontala, ĉar nature kelkaj estas pli superaj ol la ceteraj. Tiu mito, sufiĉe esplorita de la politika psikologio, estas tiom forta, ke praktike regas nian manieron esti en socio. Do, ĉu vere la civitanoj serĉas la veron aŭ serĉas la eblon resti sub la sama gvido?

La mondo de la psikologio estas tro vasta. Kaj mi jam iom klarigis en la supraj alineoj. Ankaŭ per aliaj artikoloj de ĉi tiu stranga angulo mi pritraktis la koncernan aferon: ni, la homoj, ĉefe sentas; kaj nur anekdote racie konkludas. Ni estas emociaj bestoj, kiuj lernis la mondon dum la unuaj jaroj. Normala homo ne serĉas la veron, sed la plurtavolan sekurecon. Lastatempe mi speciale sentemas pri la manko de bona infaneco en la homoj. Mi rimarkas ke en kutima familio, la infanoj ricevas amon kaj baton, agnoskon kaj psikan forĵetadon. Kutima homo kreskas kun manko de memestimo, kiu povas publike montriĝi tute malsame, tio estas per ŝajna granda memfido. Dum la vivo, normala homo serĉas ekstere tion, kion li aŭ ŝi ne havas ene. Tiu funkciado helpas volonte meti la gvidon sur la ŝultrojn de aliaj "specialaj" homoj kaj institucioj. Pluraj mezuriloj en psikologio pruvas, ke la plejmulto el la homoj bezonas eksteran aŭtoritaton, timas nekonatajn mondojn, sentas ke la malegaleco estas natura, serĉas kulpigi aliajn pri siaj neŝatataj spertoj, ne kapablas pensi sin, kiel homo kiu povas influi kaj iom ŝanĝi la mondon, ĉar la aferoj okazas, kiel ili okazas... Esploroj montras, ke normala homo lerte atingis elteni nekongruan pensafaron, kies unuoj kontraŭas unu la aliajn. En tia priskribo, kiu estas la rolo de tio, kion oni nomas "vero"? Ĉu ni la homoj serĉas ĝin?

Do luktado kontraŭ falsaj novaĵoj ne estas tiom facila, kiom oni emas pensi. Pluraj dimensioj kuniĝas bremsi tian celon. La plej bezonata tavolo estas la homa menso. Temas pri longa agado, kies rezulto ne sekuras. Gravus rimarki, ke la mendo de la publiko ne kongruas. Oni deziras samtempe ricevi nur la veron; ke tiu vero estu precize la vero, kiu restigos onin en la sama mondo same rigardota; ke oni ne bezonu ŝanĝi eĉ unu unuon de pensmaniero; ke la solvo trovi la kulpulojn kaj punu ilin por ke ĉio solvigŭ, ĉar mi havas nenian kulpon; kaj ke ĉio estu farita de aliaj, de tiuj povuloj kiujn oni malamas, amas kaj bezonas. Ne eblas kontentigi tian mendon.

En tiu momento, la publiko de la salono estas pli perdita ol en la komenco de la prelego. Iliaj mienoj montras surprizon. Do, mi prenas konkretan ekzemplon, montras ĝin ekrane kaj anoncas "Nun, ni lernos kiel scii, ĉu iu novaĵo estas vero aŭ ne". Tiam, la rideto revenas al la lipoj. Ĉio en ordo.

Skribis Viko

# MI PARDONPETAS

*(Mi ne celas ke oni konsentu kun mi. Tamen, foje mi bezonas esprimi tion, kion mi sentas)*

Tiuj kiuj konas min scias ke jam de antaŭ multaj jaroj mi vivas preskaŭ enfermita hejme, kun malofta kontakto kun la ekstera mondo. La procezo ĝis alveni al tiu ĉi punkto estis malrapida, kaj mi kalkulas ke ĝi komencis pli malpli antaŭ dudek jaroj. Tamen, mia izoligo ne estas kompleta, ĉar mi devas diri ke mi pagas miajn impostojn, (kion mi faras plezure), ke mi regule laboras en mia laborejo, ke mi tenas stabilan rilaton kun mia familia rondo, kaj ke mi ankaŭ havas sporadan kontakton kun kelkaj malnovaj amikoj miaj. Sed jam de antaŭ jardekoj mi ne kunestas en laborejaj kunvenoj, nek partoprenas en celebraĵoj, nek en sociaj kaj politikaj eventoj; kaj jam de antaŭ longe mi preferas ne vojaĝi kaj ne iri al hoteloj cele ne kontribuaĉi en la detruo de la natura medio; kaj de antaŭ ĉirkaŭ tri jaroj mi uzas amaskomunikilojn ege malofte. Se mi povus, mi iĝus nevidebla tiel, ke neniu povis min vidi. Kaj ne tial, ke la homoj kun kiuj mi kundividis la mondon havas nenion utilan al mi, sed pli bone tial, ke mi estas certa ke mi havas nenion utilan por doni al ili. Mi volas ĝeni neniun. Mi tion diras humile kaj sincere. Kial, do, ni disipu nian tempon...?

Direndas, ke kiam mi estis juna mi ege ŝatis ĝui amikecajn rilatojn, socian vivon; mi ŝatis futbalon kaj la ceterajn sportojn; mi ege deziris vojaĝi, ŝategis legi, ekkoni novajn aĵojn...Hodiaŭe, male, mi preferas resti sola kaj dediĉi min -preskaŭ kaŝeme- al desegnado kaj al iu alia sporada ŝatokupo.

Tiu Lev Tolstoj el siaj lastaj viv-jaroj (kiam sia tuta junula idearo jam disfalis kaj tiam li alvenis ĝis ideaj pozicioj kiujn plejparte hodiaŭ mi kunsentas) iam diris ke la mondo ŝajnis al li tiom absurda kaj kruela, ke tutcerte, aŭ li estis frenezulo aŭ male estis frenezuloj tiuj kiuj estis kreinta tian mondon. En tiu ĉi momento de mia vivo -estante mi jam iom maljuna- mi ne ŝatas atribui ideologian etikadojn, kaj ankaŭ ne ŝatas atribui tiajn etikadojn al mi mem. Tamen, mi pensas ke -same kiel tiu lastamomenta Tostoi- mi ne navigas tra la maroj de anarkiismo kaj pacifismo\*, kvankam, male al Tolstoj, mi ne turnas min al kristanaj idearoj nek al ali-religiaj idearoj, sed preferas ŝipiri tiujn marojn surbaze de la esplorado, analizado kaj komprenado de la kondutoj kaj de individuoj kaj de kolektivoj. Kaj por atingi la komprenadon de tiuj kondutoj mi turnas min precipe -fakte, preskaŭ ekskluzive- al scioj eltiritaj el kelkaj scienco-fakoj kiujn mi konsideras esencaj tiucele: psikologio, biologio kaj hemio\*\*. Ho, kiom multe mi bedaŭras ne esti dediĉinta min iom pli al sciencoj kaj iom malpli al beletrio! Ĉar, tutcerte, cele kompreni la mondon kiu ĉirkaŭas min, estis al mi tute senutilaj tiuj konceptoj enhavigitaj en fakaj libroj pri juro, filozofio, religio, etiko, historio... Male, estis al mi ege utile kompreni kio estas la bazaj instinktoj (precipe tiuj al postvivado, al adaptiĝo al la ĉirkaŭanta medio, al reproduktiĝo), kiamaniere funkcias lernado (kaj mallernado), kaj kian rolon ludas hormonoj kaj cerbaj konektoj en nia ĉiutaga konduto.

*\* Ni, tiuj kiuj navigadas tra tiom apartaj ideologiaj maroj, kutime ne trovas taŭgajn motivojn por partopreni en balotado kiam tio okazas en nia ĉirkaŭaĵo. Vidu, kie io si*

*mila okazus se al iu ulo ideologie kontraŭa al taŭro-luktado oni ofertus ricevi senpagan enir-bileton -laŭ sia prefera elekto- al unu el la taŭroluktaj spektakloj planitaj dum la lokaj festaj tagoj de lia urbo; tucerte, tiu ulo elektos nenium el tiuj enir-biletoj, ĉar neniu el la spektakloj ofertataj plaĉus al li!*

*\*\* Ja evidentas ke tiuj scio-fakoj kiuj pritraktas homan konduton tute ne takseblas kiel ekzaktaj sciencoj. Tamen, vidu ke ekzemple meteologio ankaŭ ne estas tia scienco kaj, malgraŭ tio, iu ajn inteligenta homo pli fidus je la veter-prognozo farita de la sialanda oficiala meteologia servo ol je la prognozo farita de iu amika najbaro. Ĉe tiu ĉi nia pritraktata afero, tiuj scienco-fakoj kiuj esploras homan konduton estas sufiĉe taŭgaj por proponi racian eksplikon al tiaj demandoj kiaj la jenaj: kial okazas seksaj agresoj, kial tiom multe da homoj suferas pro mania dependo al drogoj aŭ al vet-ludado, kial militoj eksplodas kaj daŭras, kial homoj kredas je dioj -aŭ je divenistoj- kaj kial okazas tiaj eŭforiaj celebradoj ĉe la sportaj sukcesoj de niaj preferataj teamoj. Aldonante alian ekzemplon, la tiel nomataj “ĉefaj pekoj” (avareco, pigreco, glutemo, seksemo...) havas biologian klarigon, kaj ne devas esti rigardataj el religia star-punkto, kie iu dio (kiu ne ekzistas...) donos al oni premion aŭ punon, depende de la specifaj konduto kaj persono.*

Mi pensas ke ne valoras la penon krei nek daŭre teni edukan kaj socian sistemon kie oni ne pridubos kelkajn “verojn” kiuj estas konsiderataj absolutaj kaj netuŝeblaj, sed kiuj, laŭ mia opinio, estas eraraj kaj kontraŭefikaj; precipe kaze ke ni vere deziras krei mondon regatan de inteligento kaj ne de sencio kaj fi-trompo, mondon kiu funkciu baze de sereneco kaj ne baze de nebridata kaj primitiva biologia impulso.

“Mi pardonpetas...” estas la titolo de tiu ĉi mallonga artikolo, de tiu ĉi kvazaŭ ideologia testamento. Okazas ke mi pardonpetas tial, ke mi ne povas akcepti serion da veraĵoj kiuj estas transdonataj al ĉiuj generacioj -foje eĉ dum jarmiloj. Mi pardonpetas pro tio, ke mi ne deziras partopreni en la socia vivo, nek deziras partopreni en babiladoj kaj kunvenoj, eĉ ne kun amikoj. Ĉar mi povas transdoni nenian utilan ideon al iu mondo kiu konsideras taŭgaj kaj netuŝeblaj -inter multaj aliaj- asertaĵojn kiel la jenajn:

- “Privata proprieto estas elnatura rajto”. Laŭ mia konsidero, post multaj jaroj da objektiva analizado, privata proprieto estas rabo aŭ, almenaŭ, ŝtelo. Kiun oni rabas, kiun oni ŝtelas? La tutan kolektivon. Ni imagu la diferencon inter mondo kun privataj plaĝoj kaj mondo kun publikaj plaĝoj. Kiu el ambaŭ opcioj ŝajnus al ni pli justa...?

“Legi librojn kaj utiligi kulturaĵojn estas ĉiam utile kaj konvene”. Tio dependas. Ne ĉiam. Fakte, oni ne devus legi librojn nek oni devus konsumi kulturaĵojn kiuj subtenas opiniojn racismajn perfortemajn, pri-sciencajn negismajn, sklavismajn, ŝovinismajn... Ĉu estus konvene legi la Hitleran *Mein Kampf*? Verdire, mi pensas ke pli ol duono de la kulturaĵoj estas abomenindaj.

“Konkurenco estas la baza principo por socia antaŭeniĝo”. Baza eraro kiu kondukas al kreado de socioj kaj homoj kiuj porĉiame suferas pro streĉo, maltrankvilo kaj angoro. Eraro kiu estos ankaŭ la kultura buljono kiu okazigos ĉiuspecajn perturbojn kaj perfortojn. Kiam, do, estos instruata en lernejoj tio, ke kunlaboro estas ĉiam pli konvena ol konkurenco..?

- “Konstanta ekonomia kreskado esta esenca celo ĉe ĉiu ajn ekonomia sistemo”. Jen ideo proksima al tiu vidita ĵus antaŭe, kaj same absurda kaj kontraŭefika kiel ĝi. Se celante daŭre kreski devas ni forhaki kaj/aŭ bruligi la tutan Amazonan foreston: ĉu ni daŭre kresku aŭ ĉu ni haltu kaj pensu...?

- “Sporto estas io bona, konsilinda kaj necesa por socia progreso kaj bonstato”. Ĉe tiu ĉi punkto ĉiuj konsentas, kaj destruktoj, centruloj aŭ maldestruktoj; kaj norduloj aŭ suduloj. Oni multe parolas pri la t. n. “sporta etiko”, sed ŝajnas ke neniu haltas kaj ekpensas pri kio vere temas tiu ŝajne bonfaranta ideo. Por tiuj kiuj ankoraŭ tion ne rimarkis, tiu “sporta etiko” naskiĝas el la ideo ke la ĉefa celo ĉe ĉiu ajn sporto-farado (ĉe ĉiu ajn, eĉ ĉe ŝako) estas venki rivalon, estas provi ĉiam venki, kaj des pli bone se tion oni atingas per la montrado de granda supereco. Se ne estas rivalo, kiun oni devos superi, ne estas sporto. Temas pri nepra kondiĉo. Agnoskendas, ke ĉe la konkuro-luktado ja kelkaj reguloj devas esti respektataj, kaj ke oni instruas al sportuloj pri la konscienco de la t. n. “honesto ludado” kaj la respekto al kontraŭulo. Tamen, la nepra celo estas suriri la podion, pruvi tion, ke oni estas pli rapida, pli alta, pli forta ...ol la ceteruloj (*citius, altius, fortius*). Ni troviĝas antaŭ vanteco -en ĉiuj ties sencoj- uzata kiel institucio, vestita de ceremonia vesto kaj ricevanta la ĝeneralajn subtenon kaj aplaŭdon. Se ne paroli pri tio, ke sportoj kiaj boksado kaj aŭtomobilismo aspektas al mi veraj obscenaĵoj; sammaniere, obscenaj kaj neakcepteblaj aspektas al mi tiuj milionecaj profitoj akiritaj de kelkaj homoj per sporto, profitoj kiuj (ree kaj ĉiame) devenas el la kolektiva kaj socia havaĵo. Kiam, do, oni kontestos tiun kompletan absurdaĵon? Neniam.

- “Kelkaj militoj estas neeviteblaj”\*; “fabriki kaj/aŭ vendi armilojn estas tiel respektinda negoco kiel iu ajn alia”; “se necese, oni turnos sin al uzado de perforto por defendi niajn landlimojn, kiuj estas sankteĝaj”\*. Malmulte direndas antaŭ tiaj asertoj, tiom stultaj, brutalaj kaj disvastigitaj, eĉ meze de “progresemaĵoj” homoj. Mi apliku la samajn adjektivojn por tio, kio estis foje legita de mi: “fabriki armilojn estas bone, inter aliaj kialoj, pro tio, ke oni havigas labor-postenojn al homoj”. Nu, nenio aldonendas; ankaŭ ĉi tie mi pardonpetas, ĉar mi tion ne komprenas nek konsentas.

*\* Neevitebla estas tertremo, aŭ vulkana erupcio, aŭ cunamo. Tamen, ĉiuj ajn militoj povas esti evitataj; sufiĉus kompreni ke pacema solvo estas ĉiam preferinde, eĉ por tiu partio pli forta en la batalo. Rilate al landlimoj, kvankam oni provas nin konvinki alisence, temas pri imagaj linioj, tiel imagaj kiel dioj kaj diaĵoj. Ho, aj, kiom da morto kaj detruo -dum jarmiloj!- por (kaj pro) defendi tiajn senutilajn inventaĵojn, proprajn de sen-inteligenta mondo! Sed, ankaŭe kaj domaĝe, nenio el tio estas instruata en lernejoj.*

La listo povus esti pli longa. Sed mi preferas ĉesi ĉi tie. Sufiĉas. Ĉe iu ajn amaskomunikila novaĵa programo aŭ debato, ĉe ĉiu ajn interamika babilado, preskaŭ ĉiuj partoprenantoj konsentas pri tio ĉio ĵuse vidita supre. Mi bone akceptas ke ili daŭre parolos kaj disputos. Mia opinio estas ke, fakte, ili pensas je tre similaj manieroj. Mi preferas teni min flanke, aparte, sendispute. Ili gajnis, mi malpravas.

Cetere, ŝajnas ke alvenas la momento por alia siesto... Mi salutas vin ĉiujn.

Juan García del Río

# PRI LA INUNDEGO OKAZINTA EN VALENCIO la 29-an de Oktobro 2024

La 29-an de oktobro 2024, mardo, estos rememorata de ĉiuj valencianoj dum tuta generacio, ĉar tiutage okazis unu el la plej malbonaj katastrofoj en nia historio. La rivero Magre kaj la ravino de Xiva superfluis samtempe, inundante grandajn kultivatajn kaj loĝantajn areojn en preskaŭ la tuta provinco de Valencia. Specife, la rivero Magre detruis areojn de Utiel, Requena, Chiva, Cheste, Ribarroja, ktp., kiuj situas ene de la provinco, kaj la ravino de Chiva- (ankaŭ konata kiel la ravino de Poyo-) inundis la urbojn situantajn en la sudo de la urbo de Valencia; Alfafar, Benetússer, Aldaya, Castellar, Forn d'Alcedo, Picaña, Paiporta, La Torre,... . Sekve de ĉio ĉi, la oficialaj ciferoj kaj kalkuloj estas malbonegaj:

*-563 km<sup>2</sup> da inundita surfaco, kies 10% konsistas el loĝejoj, vendejoj, oficejoj kaj entreprenoj*

*-845.372 homoj loĝas aŭ laboras tie*

*-pli ol 220 mortintoj. El ili: 9 geinfanoj, 2 adoleskantoj, 85 virinoj, 26 fremdul (9 rumanoj, 4 marokanoj, 4 ĉinoj, 3 britoj, ...)*

*-16 malaperintoj (post 3 monatoj oni aldonos ilin al la nombro de mortintoj)*

*-miloj da vunditoj (ĉefe pro osto-frakturo kaj psikaj malaranĝoj)*

*-centoj da mortintaj aŭ vunditaj bestoj kaj dom-bestoj*

*-26 pontoj kaj pontetoj sur la ravino, detruitaj*

*-99 kilometroj da fervojo (ĉu trajna, ĉu metroa), detruitaj*

*-1.522 kilometroj da ŝoseo kaj aŭtovojo, detruitaj*

*-centoj da lokaj vendejoj kaj oficejoj duon-grave aŭ tute damaĝitaj*

*-dekoj da mez-grandaj kaj grandaj entreprenoj, duone aŭ tute damaĝitaj*

*-dekoj da mem-entreprenistoj kiuj perdis sian firmaon pro manko de klientoj*

*-ĉirkaŭ 100.000 aŭtomobiloj, motorcikloj kaj bicikloj duone aŭ tute damaĝitaj*

*-centoj da hektaroj de frukto-ĝardenoj, duone aŭ tute detruitaj, koto-kovritaj*

*-dekoj da lernejoj, sportejoj, hospitaloj, benzinejoj, spektejoj, kinejoj, trajno-*

*-stacidomoj, metroo-haltejoj, bus-haltejoj, tombejoj, ... duone aŭ tute damaĝitaj*

*-centoj da tonoj de koto kaj detruitaj*

*-dekoj da arboj, ĝardeno-plantoj, ... deŝiritaj pro la ventego aŭ la forto de la akvo-fluo*

*-4.000 damaĝitaj konstruaĵoj*



La oficiala helpo malfruis tro longe alveni, kajla ĝenerala malkontento kreskas, ĉar oni kredas, ke oni komencis tro malfrue serĉi homojn kaptitajn en siaj aŭtoj trenitaj de la akvoj, kio certe pliiĝis la nombron de mortantoj. Cetere, la loka registaro (politike dekstrema) kulpigis la nacian registaron (politike maldekstrema) pro nesufiĉa kaj malfrua helpo, la nacia registaro kulpigis la lokan registaron pro manko de peto pri helpo, la loka registaro, siavice, asertis ke oni devas helpi sen antaŭa peto de tiu helpo, sed la nacia registaro asertas ke tiuj, kiuj pli bone konas la aferon, estas la loka registaro. Entute, la helpo alvenis tro malfrue kaj en malgranda kvanto ...

Solidareco estis evidenta tiuj tagoj, kun la alveno de multaj volontuloj el Valencio kaj ajna alia parto de Hispanio, pro kio la valencianoj estos eterne dankemaj.

Elías Hernández Capdevila

# CENTJARIĜO DE LA DEKLARACIO DE ĜENEVO 1924 PRI RAJTO DE LA INFANO

Tiu ĉi Deklaracio agnoskas ke viroj kaj virinoj de la mondo devas zorgi la infanojn eliminante iu ajn diskriminacion pro raso, nacieco kaj kredo.

Sed ni devas koni unue la devenon de tiu Deklaracio. Estis la angla S-ino Eglantyne Jebb, instruistino, kiu post vidi la malbonajn vivkondiĉojn de la tiutempaj infanoj, post esti helpantino dum la milito de Balkanoj en 1913 kaj post la postsekvoj de la unua mondmilito, por la infanoj, ŝi pensis krei en 1919 la Neregistara Organizo (NRO) “Save the Children”, kaj poste, en 1920 evoluigis la “Internacia Unio por la protektado de la infaneco”. En tiu momento, oni pensis pri la bezono havi “Carton de la Infanoj” kiel ilo favore al infanoj. Fakte, la Deklaracio de Ĝenevo respondis al tiuj klopodoj. La teksto adoptita en februaro de 1923 estis aprobata de la Komitato en majo de 1923. Poste, la Societo de Nacioj adoptis la tekston la 26-an de decembro de 1924 Kiel la “Ĉarto de la infaneco”.

La teksto en kies prilaborado partoprenis Eglantyne Jebb, akceptas la fundamentajn bezonojn de la malplenaĝuloj rilate la personan evoluon, edukadon, helpon ktp. Ĝi estas la unua teksto akceptita de Interregistara organizo (Societo de Nacioj), kiu agnoskas la specialajn rajtojn de la infanoj kaj la devojn de la societo, kaj kiu permesis estontajn aktivajojn. Oni povas diri ke la Deklaracio de la Rajtoj de la Infano adoptita poste, per la Unuiĝintaj Nacioj en 1959, havas tiel grandan signifon kiel havis la “Deklaracio de la Rajtoj de la Homoj kaj la Civitano” de 1789 rilate al la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj de 1948. Do, kvankam ĝi aperis en eŭropa kunteksto de militoj, la Deklaracio de Ĝenevo de 1924 enhavas jam universalan signifon.

La Deklaracio de Ĝenevo, ene de la protektado de la infaneco, signifas ankaŭ la ŝanĝon de la koncepto pri perspektivo de bonfarado, por iom post iom, agnoski verajn rajtojn de la infano.

Ĉiuj, per la agnosko pri la fakto ke la homaro devas doni al infano tion kion pli bona estas por li, certigas tiel siajn devojn, ne konsiderante aliajn privatajn cirkonstancojn, kial raso, lingvo, nacieco ktp.

Ĝiaj artikoloj defendas la bonajn kondiĉojn por la evoluo de la infano, la devon nutri la malsatan aŭ malsanan infanon, reeduki la neadaptitajn, kaj helpi la orfajn kaj forlasitajn infanojn. La infano devas esti la unua por ricevi helpon okaze de malfeliĉo, pretigi lin por estonta laborkapableco, protektante lin de ebla ekspluatado, ka fine, la infano devas esti edukita por disvolvi siajn bonajn kvalitojn por helpi siajn kunulojn.

Fine, ni povas demandi nin pri la aktualeco de ĉi tiu Deklaracio, cent jarojn poste.

Diversaj Neregistaraj organizoj (NRO) konsideras ke la sukceso de la Deklaracio de 1924, cent jarojn poste, estis malsimila, ĉar la kondiĉoj de la vivo de la infanoj ne estas kompareblaj inter la diversaj landoj. Nun estas granda diverseco en la mondo, kie infanoj ofte vivas tre bone, dum aliaj, ĉefe en la Sudo, ne havis elstareblajn antaŭenirojn en siaj vivkondiĉoj.

M. Rafaela Urueña

# , FERVOJA ANGULO

## RELKOMUTISTOJ

Antaŭ ol la kompleta aŭtomatigo de la fervojaj linioj ekzistis oficoj plenumitaj de homoj, unu el ili estis la laboro de relkomutistoj. Relkomutistoj ŝanĝis la pozicion de nadloreloj en trakforko kaj tiel, oni povis direkti vagonaron sur alian trakon. Ili ricevis ordonojn de la staciestro kun kiu ili komunikis pere de flagetoj kaj lanternoj. Estas necese diri, ke ne ekzistis telefonaj komunikiloj inter ambaŭ postenoj, do kiun trakon ŝanĝi kaj en kiu pozicio estis sciigata nur de interkonsentitaj signaloj.

Relkomutistoj troviĝis tuj apud la reloj, tie ili devis plenumi la manovrojn por komuti la trakon ĝuste en preciza momento, tio estis antaŭ ol la paso de la vagonaro, kaj poste rekomuti la trakojn en la originalan pozicion. Temis pri tre grava kaj zorgo-plena operacio, eble ĝi estis la unua paŝo por certigi la sekurecon de la fervoja trafiko, tiel misfaro de relkomutistoj estis leĝe punitaj se tio estis kaŭzo de akcidento kun viktimoj. Ekzemple, en la jaro 1931 okazis du fervojaj akcidentoj en Hispanio, unu en Taragono kaj la alia en Barcelono, kaŭzitaj de eraroj de la relkomutistoj kiuj ne ŝanĝis ĝustatempe la trakojn, ambaŭ eniris en la karceron.



Relkomutisto

Relkomutistoj antaŭ ol la ekuzo de telefonoj inter stacidomoj havis kroman funkcion. Ili devis doni bastoneton al lokomotivestro kiam vagonaro trapasis la punkton kie li troviĝis ĉe la elirejo de la stacidomo. Kiam la vagonaro atingis la sekvantan urbon, lokomotivestro rehavigis la bastoneton al alia relkomutisto, tiel oni sciigis al li, ke tiu trako jam ne estis okupita de vagonaro, do libera por alia trajno.

Averaĝe relkomutistoj laboris dum 12-hora labor-tago kaj tio okazis sub ĉiaj klimat-kondiĉoj, tio estas pluvo, neĝo, varmego ktp. Foje, oni konstruis malgrandajn budojn por ŝirmi ilin.

Kompreneble, ĉi tiu ofico evoluis ĝis la kompleta aŭtomatigo de la relkomutado. Nuntempe ĉiuj trak-forkoj troviĝas en konkreta loko, ili estas funkciigitaj rekte el la trafik-centro. Krome la direkto de la vagonaro aperas sur ekrano kontrolita ankaŭ de homo, la sukcedanto de tiuj antikvaj relkomutistoj.



Forlasita budo por relkomutisto  
Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj



fervojisto@esperanto.ac  
<https://hafe-19.websself.net>

# KAMPARA BIRDO, URBA BIRDO

El la nokto de la tempoj, kelkaj birdospecioj apudis al homoj, dum aliaj preferis foresti. La unuaj estis prauloj de la nuntempaj urbobirdoj, dum la aliaj estis pioniroj de la nunaj kamparaj birdoj. Tiu procezo okazis antaŭ jarmiloj. Birdoj profitis apudecon de homoj, restaĵojn de manĝaĵoj, foreston de predantoj, lokojn por nestumado ktp. Dume aliaj specoj ne fidis kaj restis for de la homatingo. Laŭ la tempopaŝo preciziĝis la diferencigo. El la vidpunkto de la scienca taksonomio okazis tio kion nomiĝas speciigo, nome ene de unu praspecio, kelkaj individuoj aŭ populacioj preferis homapudecon, dum aliaj preferis apartigon, kaj iĝis apartaj specioj, kun diferencaj kondutoj kaj eĉ plej ofte diferencaj morfologioj.

Konataj ekzemploj de Palearkto estas cikonioj kaj paseroj. Ĉiuj scias, ke la nomitaj blankaj cikonioj ("*Ciconia ciconia*") loĝas en vilaĝoj kaj urboj tra tuta Eŭropo, kaj ke la nomitaj nigraj cikonioj ("*Ciconia nigra*") estas tre timidaj birdoj kiuj preferas densajn arbarojn, neatingeblajn ravinojn kaj senhomajn areojn; ili estas tre malmultaj kaj fakte iom minacataj, kompare kun la jam rekuperiĝintaj blankaj cikonioj. Ŝajnas, ke la blankaj cikonioj prosperis, dum la malapudeco disde homoj fare de la nigraj cikonioj estis malprofita por tiu specio. Tamen iam mi estis atestanto de epizodo en kiu nigraj cikonioj montris sian forton kaj kapablon. Ĉe Tarifa, en la provinco Kadizo, eblas vidi septembre kiel multnombregaj migrobirdoj trapasas la Ĝibraltaran Markolon survoje al Afriko kie ili vintrumos. Plej spektaklaj estas la trapaso de grandaj birdaroj de grandaj birdoj kiel cikonioj kaj rabobirdoj. Kiam venis aroj de blankaj cikonioj (foje pli ol cent kune) ili iom ĉirkaŭflugis atendante favorajn ventojn; sed se ili ne trafis tion, ili revenis malantaŭen por atendi pli favoran momenton. Male, la nigraj cikonioj, ankaŭ en grandaj belegaj birdaroj, nur iom rigardis kaj kuraĝe atakis la markolajn ventojn. Mi vidis dekon da birdaroj de nigraj cikonioj kiuj ĉiam tiel kondukis, dum plurajn dekojn de blankaj cikonioj kiuj tiel malkuraĝe aŭ prudente kondukis. Jen la demando, ĉu la apartigo de nigraj cikonioj estis profito por tiu specio, kiu montriĝis pli forta?

Ĉe paseroj la distribuado estas pli komplika, sed ankaŭ videblas diferencoj inter kamparaj kaj urbaj paseroj. La plej konata specio nome la Dompasero ("*Passer domesticus*") hejmas en urboj de tuta Eŭrazio. La nomata Kampopasero ("*Passer montanus*", kun nigra makulo en vango) spite la latinan "montanus", ne temas pri montara specio, sed pri vere kampara specio. Dum dompaseroj estas plej oftaj urbe kaj kampopaseroj kampare, kurioze en kelkaj areoj de Orienta Mediteraneo la distribuado okazas inverse. Oni ne scias kial, sed certe ĉiu specio preferas sian areon, kaj apenaŭ miksiĝas multnombre. Meze de tiuj du specioj estas la nomitaj Itala pasero ("*Passer italiae*") kaj la Hispana pasero ("*Passer hispaniolensis*"). Dum la Dompasero havas grizajn kapovertojn, la aliaj tri specioj, pli kamparaj havas malhelbrunajn kapovertojn; ĉu tiu diferencio rilatas al la diferenca vivmedio? Tiuj diferencoj videblas en maskloj, dum inoj estas nedistingeblaj.

Alia tre konata urbospedio estas la kolomboj. Tiom ke eĉ blanka kolombo iĝis universala pacosimbolo. Estas centoj da kolombospecioj tutmonde, fakte ĉirkaŭ tri cent; sed tiuj kiuj abundegas en tutmondaj urboj kiuj prezentas tiom diversajn kolormodelojn estas fakte degeneritaj individuoj, eĉ la plej blankaj. Ĉiuj estas degeneraĵoj de la specio Rokkolombo ("Columba livia") kiu estas ĝenerale griza, kun du nigraj strioj en flugiloj, pli malhela vosto, blanka pugo kaj brilkolora kolumo. Kial nun estas tiom da miloj da kolomboj helaj kaj eĉ blankaj? Ĉar multaj specioj de kortobirdoj en kontakto kun homoj dum jarmiloj perdas siajn karakterajn kolorojn, malheliĝas kaj ĉefe blankiĝas, kiel okazis al anseroj, anasoj kaj aliaj. Do, la blanka kolombo, simbolo ne nur de paco, sed ankaŭ de la Sankta Spirito inter multaj aliaj aferoj, estas simple degenerita speco.


Ankaŭ invadaj specioj preferas aŭ kamparon aŭ urbon. Dum la 20-a jarcento etendiĝis tra ruraj areoj Bovardeo ("Bubulcus ibis"), nature preskaŭ blanka ardeo kiu en Afriko apudis al elefantoj kaj aliaj grandaj mamuloj, kaj en Hispanio (kaj ne nur) sekvis ĉu al traktoroj ĉu al ŝafaroj aŭ bovaroj, kiuj same forigas insektojn kiujn ili predas. Sed en la lasta kvarono de la jarcento disvastiĝis la Turka turto ("Streptopelia decaocto") ĉefe en urbaj parkoj kaj similaj areoj. Tio fakte koincidis kun la malpliigo de la indiĝena Eŭropa turto ("Streptopelia turtur"), kiu vivis ĉefe en kamparaj medioj, tre minacata ĉefe de ĉasistoj. Fine de la jarcento du specioj de papagoj nome Kolumpapago aŭ kolumpsitako ("Psittacula krameri") kaj ĉefe la Monaĥa psitako ("Myiopsitta monachus") invadis la ĝardenojn ĉefe de grandurboj. Ŝajne invadaj specioj trovas pli interesaj la grandurbojn kaj la homapudecon.

Ne nur specioj, ankaŭ individuoj, elektas siajn habitatojn kaj kongruigas siajn kondutojn al tiuj. Mi fakte interesiĝis pri tiu temo jam antaŭ ĉirkaŭ du dek jaroj, kiam mi vidis en Madrido merlojn ("Turdus merula") tute maltimidaj tre proksimaj al mi en ĝardenoj, dum en miaj ruraj areoj merloj vivis ĉefe en kamparo, tre timidaj tuj forirante skandale al minimuma homapero. Kelkaj jarojn poste mi vidis saman konduton ĉe Verda pego ("Picus viridis") malsimilan en Madrido disde miaj kamparoj. Post kelkaj jaroj merloj urbiĝis ankaŭ en mia urbo kaj venis ĝis mia korto tute senhonte kaj maltimidi por ŝteli la manĝaĵojn de mia hundo. Ĉu tio estos starto de nova speciigo? Ni vidos tion post kelkaj jarmiloj. Se eblos.

Kani



# NEKROLOGOJ



Floreal Gabalda naskiĝis en Francio en 1946 al hispanaj gepatroj. Post la bakalaŭriĝo en 1965 li studis en universitatoj de Grenoble kaj en la jaro 1971 ricevis titolon Doktoro- Inĝeniero. Li estis tre modesta. Poste, anstataŭ la militservo, li preferis labori kiel kooperanto kaj profesoro en Venezuelana Universitato de Teknologio (IUT) en Karakaso, kie li restis kvin jarojn. Esperanton li ellernis samtempe kun sia patro fine de la 1963a jaro. Li tuj komencis serioze aktivi en Venezuelana Esperanto-Asocio, en junulara movado kaj en SAT. Li estis honora membro de TEJO. Kun sia edzino li konatiĝis en la jaro 1978 dum la 63-a Universala Kongreso en Varna (Bulgario). Post la geedziĝo en Ĉeĥoslovakio ili reiris Venezuelon en la jaro 1980, kie li daŭrigis

sian profesion postenon de profesoro. Kune ili aktivis en VEA. Floreal fariĝis la vicprezidanto, Liba kasistino kaj ŝi iniciatis la E-kronikon. Ili ambaŭ ankaŭ instruis Esperanton. En Karakaso naskiĝis iliaj du infanoj Belonia kaj Ideal, ambaŭ denaskaj esperantistoj. Post la malfavora situacio en Venezuelo ili revenis Francien en la jaro 1986a. Ili partoprenis multnombrajn E-kongresojn, seminariojn kaj aliajn E-aranĝojn: UK, IK SAT, IFEF, ILEI, MES, PSI, BET, jarfinajn renkontiĝojn en Germanio: IF, NR, Luminesk, seminariojn en Kvinpetalo, kastelo Greziljono, Metabief, Internaciajn E- Semajnojn en Hispanio kaj plurajn aranĝojn en Ĉeĥio. Ili ŝatis vojaĝi, viziti multajn landojn kaj ĝui esperantistan etoson. Floreal forpasis pro la kancero la 4an de decembro 2024. Li tre multe mankos al ni.

Kun ioma prokrasto ni eksciis pri la forpaso de du tre veteranaj kaj aktivaj esperantistoj membroj de la Madrida Esperanto-Liceo, Angelita Sanz Mayor kaj Pepe Platas.

## FORPISIS ANGELITA SANZ MAYOR

Antaŭ du monatoj forpasis Angelita Sanz. Iu samklasano en ateliero rimarkis ŝian mankon kaj post atentigo al la urĝo-servo oni konstatis ŝian forpason. Ni jam sciis pri ŝia febla sanstato sed ŝi plenumis striktan dieton kaj medicinan kontrolon; tial la novaĵo pri ŝia forpaso ŝokis nin.

Angelita, naskiĝinta en la vilaĝo Valdevacas, Segovia provinco, estis oficisto en la Ministerio pri la Fisko (Hacienda) kaj estis membro de Madrida E-Liceo ekde 1982.



Ŝi membris ankaŭ en HEF. Ŝi regule partoprenis la lundajn babiladojn de EL; ĉeestis multajn kongresojn hispanajn kaj internaciajn, per longaj busaj ojaĝoj tra Eŭropo. Ŝi frekventis ankaŭ la kongresojn de fervojistoj kaj la Kulturajn Semajnojn en Katalunio. Malgraŭ sia alta aĝo, ŝi havis grandan kulturalan aktivadon, partoprenante diversajn atelierojn en la centroj por maljunuloj de sia vartalo, vizitante ekspoziciojn en Madrido kaj ĉeestante prelegojn, teatraĵojn kaj kulturajn vizitojn.

Ŝi ripozu pace.

Ankaŭ ni bedaŭras la forpason de José Francisco Platas. Lia alta aĝo, liaj vid-problemoj kaj fine lia Alzheimer-malsano provokis, ke antaŭ kelkaj jaroj li ĉesis veni al niaj lundaj babiladoj. Ŝia edzino Paquita informis, ke li forpasis pasintan aŭguston.

Pepe estis la plej veterana el la madridaj esperantistoj; li lernis la lingvon en 1966 kaj dumlonge partoprenis la babiladojn kaj kunlaboris en la agadoj de Liceo, inter alie, kiel ĝia kasisto. Ankaŭ li membris en HEF.



Li havis interesan vivon. Instigata de sia onklo, li iniciĝis en cirk-arton. Pepe elektis la fakon ŝnurdancadon, surpris la kromnomon Volatín, kaj ludis en multaj cirkoj, teatrejoj kaj kinejoj hispanaj kaj eksterlandaj. En tiu medio li konatiĝis kun Paquita, iniciĝinta en trapezo, kiu fariĝis lia edzino. Sed en tiuj malfacilaj postmilitaj jaroj li devis plenumi aliajn metiojn; rekta vendado de parfumoj, poste kelnero kaj kuk-faristo kaj fine, ĝis emeritiĝo, li laboris en banko, kie li estis tre estimata de la kunlaborantoj. Li frekventis la kunvenojn de la Klubo de klaŭnoj kaj cirkartistoj de Madrido, kaj partoprenis kelkajn televidprogramojn kaj filmojn dublante aktorojn sur la ŝnuro aŭ kiel krom-aktoro.

Amatora pentristo, tre legema, aŭtoro de la libro *Ases y figuras estelares del alambre* (Elstaruloj de la ŝnur-danco), li lasas vidvinon, tri gefilojn, nepojn kaj pranepojn. Pepe, ripozu pace.

La pasintan 26-an de oktobro 2024 forpasis nia kara samideano Juan Antonio Torres Galán, *Juantor*. Ne multaj homoj en Esperantio scias, ke Juan Antonio estis juna granda espero en la gitar-ludado. Li estis lernanto de grandaj klasikaj gitaristoj, kiel Andrés Segovia kaj José Tomás Pérez. En la jaro 1973,



nur 22-jaraĝa li atingis la Nacian Premion pri Klasika Gitaro. Li same komencis studojn pri Juro kaj Kemio. Bedaŭrinde, en la jaro 1977 li suferis trafik-akcidenton en Italio. Post 18-monata restado en hospitalo, dum kiuj kuracistoj antaŭvidis malmultajn esperojn, li savis sian vivon, tamen li suferis grandan handikepecon, kiu malfaciligis al li promeni kaj paroli. Krome, li devis forgesi definitive sian gitarludan karieron. Tamen, sian rideton kaj optimismon li neniam perdis. En la jaro 2007 amikoj de Juan Antonio fondis en Sevilo la Asocion de Amikoj de la Gitaro "Juan Antonio Torres".

Li lernis Esperanton kaj li partoprenis ofte en renkontiĝoj de la sevila grupo kaj en andaluziaj kongresoj. Tiel, malgraŭ siaj problemoj por promeni, li ofte ĉeestis ekskursojn dum kongresaj tagoj. Same, li neniam rezignis konversacion en esperanto, kvankam li devis malrapide paroli kaj kompreni.

Maldekstre Juan Antonio salutas la reĝon Juan Carlos, kiu gratulas lin kiel elstara gitaristo.



# IOM DA MATEMATIKO (16)

## Etimologioj kaj signifoj de kelkaj vortoj.

Hodiaŭ ni okupiĝu pri la deveno de kelkaj vortoj uzataj en matematiko, deveno ofte tre kurioza.

Kaj ni komencu pri la nomo mem de tiu scienco: **matematiko**. Tiu ĉi vorto devenas el la greka “mathematikós”, “tiu kiu amas lerni”.

En Esperanto estas vorta paro, bazo de matematiko, kiu de tempo al tempo vekigas iom da konfuzo. Temas pri la vortoj **numero** kaj **nombro**.

Ni iru al PIV:

**Numero** (el lat. “numerus”): cifero aŭ numeralo, montranta la vicon de iu objekto inter aliaj.

**Nombro** (el la franca “nombre”): Elemento de unu el la nombro-sistemoj, nome entjera nombro (... -2,-1,0,1,2 ...), racionala nombro (kvociento de entjeroj), reela nombro ... aŭ kompleksa nombro.

Tiuj PIV-aj difinoj montras la malfacilecon transdoni precizajn difinojn al ĝenerala publiko, kiu plejparte ne fakas pri matematiko. Ni klopodu iom klarigi la aferon per ekzemploj:

Kiam oni diras “donu al mi tri pomojn”, ni parolas pri kvanto, do pri **nombro**. Kaj ni povas, ekzemple, adicii 3 pomoj + 2 pomoj = 5 pomoj.

Tamen, kiam oni diras “mi loĝas en la portalo 3”, ne temas pri kvanto, sed pri vorto, kiu karakterizas aŭ etikedas iun objekton. Do, tiam temas pri **numero**. En tiu ĉi kazo ne havas sencon adicii, kiel antaŭe: portalo 3 + portalo 2 ne estas portalo 5, eĉ ne havas sencon adicii portalojn. Same, ni parolas, ekz., pri telefonnumero, ne pri telefonnombro.

**Kalkulo**. Ĉu vi iam rimarkis la similecon de la du vortoj “kalkulo” (operacio per nombroj) kaj “kalkuluso” (ŝtoneto, kiu iafoje formiĝas en la glandaj vezikoj)? Eĉ en la hispana oni uzas la saman vorton, “cálculo”, por ambaŭ. Tiuj du vortoj devenas el la latina “calculus” (“ŝtoneto”), kiu rilate matematikon portas nin al pratempo, kiam kalkulojn oni faris ofte pere de ŝtonetoj.

**Grado**. El la lat. “gradus”, estas mezurunuo por anguloj, temperaturo, alkohola enteno, ..., eĉ en la ĉiutaga lingvo kiel proksimuma mezurunuo de eco (eleganteco de tre alta grado, gradoj en la virto, ktp). Sed en ĝia origino, “gradus” signifis “ŝtupo”. En la hispana ekzistas la vortoj “grada”, “graderío”, ...

**Minuto**. El la lat. “minutus” (“malgranda”). En la hispana ekzistas “diminuto”.

**Sekundo**. Pratempe ekzistis “unua minuto” kaj “dua minuto” (“sekundus minutus”). Tiu lasta perdis “minutus” kaj restis nur “sekundus”.

**Triangulo.** Oni bezonas malmulte klarigi pri ties signifo. Sed estas tri specoj de trianguloj, pri kies nomoj meritas ion diri:

**Egallatera.** Triangulo kun tri egale longaj lateroj, do logika nomo.


**Izocela.** Triangulo kun du egale longaj lateroj. (“isos” = egala; “skelos” = kruro). Do, izocela signifas “egalaj kruroj.”

**Skalena.** Nesimetria triangulo. El la greka “skalénós” = lama, oblikva. Do, estas tiu triangulo, kiu lamas (jes!).


Tre fama triangulo estas tiu, kiu havas ortan angulon. Iliaj lateroj havas eĉ specifajn nomojn: katetoj kaj hipotenuzo.

**Hipotenuzo.** El la greka “ipó” (“sub”), la verbo “teínu” (“streĉi”) kaj “-ousa” (ina participo). Ĝia nomo rilatas al la maniero desegni ortajn triangulojn en praa Grekujo: surtere kaj kun stangoj kaj ŝnuroj (“geometrio” signifas mezuro de la tero). Post desegno de la du katetoj (la orta angulo) oni devis streĉi ŝnuron por kunigi la du katetojn pere de la Hipotenuzo.

Laŭ alia versio, hipotenuzo estis la latero, kiu subtenis la triangulon (hipo=sub, tenuzo=kiu tenas), ĉefe ĉar oni kutimis, en praa Grekio, desegni la ortan triangulon tiel kiel aperas ĉi sube dekstre.



Kutima praa desegno



Kutima nuntempa desegno

**Kateto.** El la greka “káthetos” (“tio, kio malsupreniras orte”, kiel lodo). Efektive, en orta triangulo, unu kateto falas aŭ malsupreniras sur la alian orte (supra maldekstra desegno).

**Gramo.** El la greka “grámma” (“litero”, “skribaĵo”), prenita kun signifo de “ŝtoneto” en la latina. Do, io tre malgranda.

**Metro.** El la greka “métron”, “mezuro”. La uzo de tiu ĉi vorto kiel mezurunuo estis enkondukata post la franca revolucio (1789) kaj, iom post iom, akceptita preskaŭ en ĉiuj lingvoj. Ĝia historio estas tiel interesa, ke meritas eble propran estontan artikoleton.

*Jesús M. García Iturrioz*

*jmgiaa@hotmail.com*

